



Esperanto en Danio

20-a jarkolekto • n-ro 1 • februaro 2013



Simbolo de la jara temo

Esperanto en Danio

membroorgano de
Dana Esperanto-Asocio

ISSN 0909-6124

Adreso de la asocio/prezidanto:

Ileana Schrøder

Vestavej 4, 2770 Kastrup

☎ 32 51 31 16 dea@esperanto.dk

Ĝirokonto: 1551-805 7370

UEA-kodo: deaa-t

Kromaj estraranoj:

Arne Casper Mortensen (kasisto)

Finn Østerbæk (vicprezidanto)

Jens S. Larsen (sekretario)

Bent Jensenius

Peter Wraae

Redakcia adreso:

Jens S. Larsen

c/o Trillingsgård, Munkebjergvej 77
2770 Kastrup

☎ 52 64 44 72 eed@esperanto.dk

Presado:

DDFO

Adresânĝoj al:

La prezidantino (adreso supre)

Represo de artikoloj el EeD estas
permesata kun indiko de la fonto.

Limdato por la venonta numero:

01.05.2013

Enhavo

Temo de la jaro 2013 : Lingva justeco3

Gazetaro.....4

Kopenhago.....4

Jarraporto de KEK 2012.....5

Kotizoj de KEK 2013.....6

Kalkulaĵo de KEK 2012.....7

Printempa programo.....8

Peter Wraae salutas el Ĉinio:.....9

Progresraporto pri 'Mia Fueno

Infanaĝo'9

La Zamenhof-festo 2012.....10

Novaĵo el la Esperantomuzeo en

Vieno.....11

Laborkunveno en Edinburgo.....12

49-aj Baltiaj Esperanto-Tagoj.....13

Temo de la jaro 2013 : Lingva justeco



Komenciĝis la Agado por informado pri Esperanto en la jaro 2013 en ĉiuj landoj en la kadro de gazetara kampanjo ĉirkaŭ la Universala Kongreso en Rejkjaviko, kies temo estas: “Insuloj sen izoliĝo: por justa komunikado inter lingvokomunumoj”. DEA sendis fine de januaro la unuan gazetaran komunikon pri tiu temo. Estos interese sperti ĉu ĝi havos eĥon en la dana gazetaro. Ni petas niajn membrojn sendi al ni informojn se rimarkendas artikoloj en la lokaj gazetoj.

Pri la ĵus pasinta jaro 2012 ni plenumis la planitajn taskojn, sed lastmomente, en decembro ni spertis malĝojigan, eĉ se ne surprizan informon: la Esperanta Unuiĝo de Næstved decidis dum sia eksterordinara ĝenerala kunveno okazinta la 11-an de decembro malfondi la asocion pro manko de fortoj, post la forpaso de Henning Olsen, kiu estis la vigla kaj energia kunordiganto de la Unuiĝo de Næstved. La 4-an de aŭgusto EUN atingis aranĝi kunvenon kun bufedo okaze de la 35-a datreveno de sia fondiĝo kaj eldoni kajeron kun trarigardo al la 35-jara historio; tiom pli dolora estis la informo pri la malfondo de EUN, nur kelkajn monatojn poste.

La venontaj semajnoj okazos vigla agado: partopreno en la Foiro *Krop-Sind-Ånd* inter la 1-a kaj 3-a de februaro en Kopenhago, same de la 1-a ĝis la 3-a de marto en Ålborg. Ni bonvenigos nian gaston Radojica Petrovic meze de februaro kaj en aprilo dum nia jarkunveno ni bonvenigos alian gaston, Ed Robertson el Skotlando, kiu gastigis min dum mia kelktaga restado en Edinburgo fine de januaro. Temis pri laborkunveno inter reprezentantoj de pluraj landaj asocioj por kunordigi projekton Grundtvig, pri kiu mi poste informos pli detale.

Ileana Schrøder

Gazetaro

Por ĉi tiu numero estis trovita nur mencio en Berlingske Fri sabaton la 1-an de decembro pri “la Hobito” kiu estas tradukita en 58 lingvojn, inkluzive Esperanton.

Ĵaŭde 24-an de januaro Radio 24/7 dissendis epizodon de “Den store roman” (La granda romano), en kiu Peter Weide rakontis pri Esperanto, precipe laŭ la vidpunkto de denaska parolanto.

Eltondaĵojn sendu al: Grete Nielsen, Bogensevej 37, 1–185, 4700 Næstved.

Kopenhago

Ĉiuj kunvenoj de Konversacia Esperanto-Klubo, Kopenhago, okazas en la Kulturdomo, Tomsgårdsvej 35, 2400 København NV, ekde la 19-a ĝis la 21-a horo.

Printempa programo de KEK

04.02.2013. Mette Hjerting rakontos pri siaj travivaĵoj vagante laŭ la pilgrima vojo al Santiago de Compostela.

11.02.2013 Hieraŭ estis la fastfina festivalo. En Brazilo oni nomas ĝin karnavalo. Ni spektu la brazilan filmon 'Karnavala festo en Esperanto'. <http://www.youtube.com/watch?v=ffIsx8SBBkI>

18.02.2013 Studvespero. Sur la spuroj de Julio Baghy.
<http://vimeo.com/25273503> Ni legu kelkajn el liaj poemoj.

25.02.2013 Ni celebru la semajnon de amikeco.
<http://uea.org/informado/sia.html>

04.03.2013 Prelegeta vespero. Venu prelegeti pri io ajn dum ne plu ol 5 minutoj!

11.03.2013 H.C.Andersen estas mondfama dana verkisto. Ni spektu la prelegon pri li de Ole Therkelsen okazinta en la UK en Kopenhago. http://www.youtube.com/watch?feature=player_embedded&v=KXnnon22tVU

18.03.2013 Jarkunveno de KEK. La jarraporton de la prezidanto kaj la finan tagordon ni sendos al la membraro meze de februaro. Bonvolu atenti la sekvantajn statutojn:

- *Voĉdonrajton en la Ĝenerala Kunveno havas ĉiu membro, kiu pagis kotizon minimume 1 monaton antaŭe. (§3.4)*
- *Proponoj al la Ĝenerala Kunveno devas esti skribe prezentitaj al la estraro minimume 14 tagojn antaŭ la Ĝenerala Kunveno. (§6.2).*

25.03.2013. Konversacia kaj kanta vespero.

01.04.2013. Pro Pasko neniuj kunvenoj.

Informoj pri la programoj sekvos post kelkaj semajnoj. Bv. informiĝi per la kalendaro ĉe www.esperanto.dk.

La Zamenhof-festo 2012

La 15-an de decembro 35 samideanoj diversaĝaj kaj diversdivenaj ĝuis feston en Tomgårdssvej okaze de Zamenhoftago. Unue ni manĝis abundan kaj ege bongustan manĝon preparitan de Ana Ĉumbelic Røssum, Ileana Schøder kaj Zita Garbaravicién. Post festprelego de Betty Chatterjee, muzikumado de nova membro Gert Pedersen, du konversacioj per skajpo kune kun esperantistoj de Rusio, deklamado de Patryk Kusek de la unua parto de Sinjoro Tadeo kaj komuna kantado de tute nova kanto honore de la knabo Ludoviko verkite de Betty Chatterjee kaj Jens S. Larsen. Zoia Voskanian gitarludis kaj gvidis ties kantadon. Intertempe ni kafumadis kaj kelkaj partoprenantoj aĉetis novajn librojn.

Dankon al la aranĝantoj, kontribuantoj kaj ĝuantoj de la festo, kiu estis bona fino de la jara agado. Jen la teksto de la nova Zamenhof-kanto:

La revo pli kara ol or'.

Revadis la knab' Ludoviko,
Pri io pli kara ol or'
Li revis pri paco senfina
pro tio ni kantu en ĥor'

ktp.

Ekkreis la knab' Ludoviko
La ilon por ĉies kompren'
Per uzo de vortoj komunaj
Solviĝos la homa dilem'.

Ni kun Ludoviko dividu

*La revon pli karan ol
or'.*

Ni kun Ludoviko dividu

La revon pli karan ol or'

Batalis surstrate
najbaroj

Pro manko de
interkompren'.

Paroli per lingvo neŭtrala

Jen solvo de l'homa dilem'.

Ni kun Ludoviko dividu



Ni kun Ludoviko dividu

ktp.

Jen donis knabet' al la
mondo

Donacon pli karan ol or'.

Se l' mondo ignoras la
kanton

L'espero plurestas en kor'.

Ni kun Ludoviko dividu

ktp.

Peter Wraae salutas el Ĉinio:

Saluton Betty kaj ĉiuj en KEK.

Mi nun restis dum 10 tagoj en Hainano en Ĉinio. Kiam mi venis al la flughaveno mi estis ege bonvenigita de pluraj homoj, la ĉina organizanto, Dennis Keefe mem, kaj sia koramikino. Mi estas la sola eŭropano de la gelernantoj, kaj plejparto de grupo estas juna ĉina gelernantoj, sed ankaŭ estas virino el Mongolio.

La grupo ĉiujare estas tre mallarga ol lastjare, ni nur estas 15. La vetero kaj la hotelo estas pli bone ol lastjare. Ni loĝas proksime al la klasĉambro, ni nur devas piediri dum tri minutoj por akiri tion. Dennis instruas ege bone kaj mi nun vere povas konfesi ke lia BEK sistemo estas tre bona metodo por eklerni Esperanton. Mi pensas fari prelegon pri tio en nia klubo.

Hodiaŭ, dimanĉe, ni planis ekskursi al iu parko, sed tio estis malanoncita pro la pluva vetero. Mi lernas pli da Esperanto kaj pri tio mi estas kontenta kaj mi ankaŭ devas konfesi ke la gramatiko estas facila, sed – mi bezonas tempon por memori la regulojn kiam mi parolas.

Mi ekamikiĝis kun viro el Usono kiu loĝas en Ĉinio dum 23 jaroj. Li helpas al Dennis pri la instruado, kaj ni kune havas tre ujtnan tempon. Ni ofte trinkas teon vespere kaj li helpas al mi multe kiam li korektas min.

Mi tre ĝojas revidi vin.

Amike

Peter.

Progresraporto pri 'Mia Fueno Infanaĝo'

En decembro mi finenkomputiligis kaj komence korektis la manuskripton tiel eble plej bone. Pro la fakto, ke kompreneble restis malglataĵoj, mi plusendis ĝin al Jens S.Larsen, kiu nun havas la eĉ pli grandan laboron de la finredaktado.

Ni ambaŭ esperas, ke ni informu al vi en la venonta numero de Esperanto en Danio, ke la libro estos finredaktita.

Se vi malpacienas legi eron de la libro, vi povas legi eltiraĵon en mia blogo: <http://rosejo.blogspot.dk/2012/12/antaukristnaska-bucado.html>

Betty Chatterjee

Ĝenerala Kunveno de KEK

Ĝi okazos lunde la 18-an de marto 2013 je la 19-a horo, en la kutima kunvenejo: Tomsgårdsvej 35, 2400 København NV.

Provizora tagordo

1. Elektro de kunvengvidanto
2. Elektro de protokolanto
3. Raporto de la prezidanto
4. Kalkulaĵo
5. Proponoj.
6. La estonta laboro
7. Kotizo
8. Elektro de prezidanto. Betty Chatterjee ne pretas esti reelektota. Peter Wraae pretos.
9. Elektro de ceteraj estraranoj
10. Elektro de anstataŭantoj
11. Elektro de revizoro kaj anstataŭanto
12. Eventualaĵoj

Jarraporto de KEK 2012

Unue mi volus prezenti al vi la faktojn pri la dumjara agado de la klubo.

Ni klubkunvenis 45 fojojn, kaj la programo inkludis:

- prelegojn
- konversaciajn rondojn pri multaj diversaj temoj.
- studgrupojn.
- kvizvesperon.
- Esperanto-doman vesperon.
- DEA- vesperon.
- junularajn vesperojn.
- Diversajn ekskursojn.
- Skajpo-konferencajn vesperojn kunlaborante kun la Esperanto-klubo en Kaburbo kaj Katalin Kovac kaj sia familianoj.
- Kunlabore kun DEA kaj la Fonduso por Esperanto-domo 35 esperantistoj vigle festis okaze de la Zamenhof-tago.

Detalaj informoj pri la aranĝoj legeblas en la numeroj de Ponto kaj Esperanto en Danio de 2012.

Aliaj menciendaj faktoj estas:

La membraro daŭre malkreskas; en la jaro 2008 KEK havis 72 membrojn, en la jaro 2011 60 membrojn kaj en la jaro 2012, 52 membrojn. Nia honora membro Bodil Kühlmann forpasis en Aŭgusto kaj Henning Olsen forpasis en Oktobro. Malgraŭ la fakto, ke du trionoj el la nuntempaj membroj estas pensiuloj, ili fidele partoprenas la klubajn aranĝojn, tial samkiel lastjare la ĉeestantaro dum klubaj kunvenoj estas inter 10 kaj 15. Daŭre ni malofte krokodilas kaj niaj konversacioj estas viglaj. 6 KEK-anoj kuraĝis ekzameniĝi dum la mondvasta skriba ekzameno la 9-an de majo, kio pravas, ke oni serioze pritraktas la lingvon.

Lastjare mi raportis pri nia intenco plibonigi la intergeneracian kunlaboradon. Mathias Dalmose akceptis la respondecon por la lasta kunveno de la monato. Kelkaj el niaj pli bonaj kunvenoj printempe okazis dank'al

lia instigo, kaj venis ankaŭ junuloj. Tamen pro familiaj kaj aliaj kaŭzoj Mathias portempe ne plu respondecas pri 'junularaj kunvenoj'.

Pri la kunlaborado kun la Sunda regiono: en 2012 ne okazis kunvenoj kune kun svedoj, tamen ni daŭre kunlaboras pri la eldonado de la revuo 'Ponto'.

Pri la ekskursoj: la lastjara decido aranĝi dumtagajn ekskursojn jam sufiĉe bone sukcesis. Interalie ni vizitis muzeojn kaj ekskursis al Svedio.

Krom la hejmpaĝo esperanto.dk la programo kluba ĉiam legeblas en la fejsbuka paĝo “Amikoj de la Dana Esperanto-Asocio”, kiu havas 201 apogantojn. Plue ĉiusemajne nome de la estraro mi sendas informon pri la kluba agado retpoŝte al membroj kaj aliaj kontaktoj.

Finfine mi dankas al miaj bonegaj samestraranoj kaj al ĉiuj helpemuloj pro la apogado.

Kotizoj de KEK 2013

Unuopa membriĝo estos 200 kronoj jare.

Membriĝo geedza estos 300 kronoj jare.

Laŭ la interkonsento dum la lasta jarkunveno ni instigas ĉiujn membrojn krompagi 50 kronojn kiel apogo-pago por Esperanto-doma fonduso.

La plej facila kaj plej malmultekosta pagmaniero estas retbanke. 1551 – 2025558. Aŭ se vi preferas, vi povos pagi al nia kasisto dum via venonta vizito al nia klubo. Ĝirilojn ni ankaŭ povus sendi al vi, se vi preferus tian solvon.

Kalkulaĵo de KEK 2012

Resultatopgørelse for 2012

Enspezoj/Indtægter

	kr	kr
Kotizoj / Kontingenter		12.700,00
Interesoj / Renter		80,41
Esperanto Domo		900,00
Kaffekasse		<u>2.041,52</u>
Sumo		15.721,93


Elspezoj/Udgifter


DEA-Kotizo / DEA-kontingent	6.900,00
Donacoj / Gaver	469,95
Arangoj / Arrangementer	1.326,30
Administrado / Administration	302,45
Depagoj / Gebyrer	300,00
Ponto	649,90
Reprezentigo / Repræsentation	506,50
Biblioteket	328,00
Sumo	10.783,10

Gajno / Overskud 2012 **4.938,83**

Biblioteko / Bibliotek	1,00
Propra kapitalo / Egenkapital 1/1 2012	38.808,59
Jara gajno / Årets overskud	4.938,83
Sumo	43.748,42
Propra kapitalo / Egenkapital 31/12 2012	43.748,42


Kopenhago / København den 28/1 2013



Betty Chatterjee
Prezidanto/formand


Finn Østerbæk
Kasisto / Kasserer

La supra kalkulaĵo estas kontrolita per atestoj kaj trovita korekta
La ekzisto de la poseduloj estas konstatita

Ovenstående regnskab er gennemgået i henhold til bilag og fundet i orden
Beholdningernes tilstedeværelse er konstateret


Jørgen Mannike
Revizoro / Revisor


Tara Gregers
Revizoro / Revisor

Novaĵoj el la Esperantomuzeo en Vieno



La jaro 2013 alportas novaĵon ankaŭ por la Esperantomuzeo en Vieno: Pere de nur 4 eŭroj eblas viziti tri muzeojn de Aŭstria Nacia Biblioteko, t.e. la Esperantomuzeo, la Muzeo por Tergloboj kaj la Papirusa Muzeo. La mondfama Muzeo por Tergloboj same kiel la Esperantomuzeo situas en la palaco Mollard en la centro de Vieno. Ambaŭ muzeoj estas unikaj, ĉar la koncernaj kolektoj estas la plej grandaj sur sia tereno en la mondo. Ankaŭ en 2012 venis multaj vizitantoj, ekzemple pli ol 10.000 en la Esperantomuzeon.

Jam de pluraj jaroj la Kolekto por Planlingvoj kaj Esperanto-muzeo de la Aŭstria Nacia Biblioteko kontinue skanas kaj enretigas malnovajn Esperanto-gazetojn por faciligi la aliron al tiuj historiaj fontoj. Sekve jam 25 diversaj gazetoj estas senpage legeblaj pere de la retejo de la Esperantomuzeo. Oni ne devas ie registriĝi, sed nur alklaki la ligilon de la dezirata gazeto kaj tuj oni povas foliumi kaj legi ĝin. La plej malnova gazeto estas la unua numero de “La Esperantisto” el la jaro 1889, la plej nova gazeto estas la sesa numero de “Esperanto. Internacia Revuo eldonata de Universala Esperanto-Asocio” el la jaro 1946.

Bernhard Tuidar

Laborkunveno en Edinburgo




Kiel mi antaŭe menciis, fine de januaro mi ĉeestis kelktagan laborkunvenon pri projekto Grundtvig. Ĉeestis pluraj reprezentantoj de landaj asocioj kaj ni diskutis la celojn kaj la temo de la projekto. Jen foto de la tria labortago de la Kosmoseminario en Edinburgo. De maldekstre estas

Bruĉjo Kasini, Ed Robertson, Ileana Schrøder, Sara Spanò, Francesco Maurelli, Anna Marszal, Sasha Murr, Michael Boris Mandirola kaj Zsafia Korody, Esperanto-urbo Herzberg.

Omaĝe al la fama poeto William Auld, kiu forpasis en 2006, estis organizita vizito al lia tombejo. Pro sia elstara agado li plurfoje estis proponita kiel kandidato de Nobel-premio pri literaturo. La tombejo situas en Dollar, vilaĝo kiun oni atingas post kelkhora vojaĝado for de Edinburgo. Dum la vizito mi voĉlegis la poemon kiun Nicola Ruggiero skribis memore al Auld. Nicola devis bedaŭrinde forvojaĝi pli frue kaj ne povis ĉeesti tiun eventon, kiun li mem proponis.

Ileana Schrøder



49-aj Baltiaj Esperanto-Tagoj

Litova Esperanto-Asocio invitas Vin partopreni vicajn ĉiujarajn internaciajn somerajn tradiciajn la 49-ajn Baltiajn Esperanto-Tagojn (BET- 49) kiuj okazos de la 6a ĝis 14-a de julio 2013.



LOKO: BET-49 okazos en la orientlitovia urbo regiona centro UTENA , kiu estas fondita en 1261 kaj estas unu el la plej malnovaj loĝlokoj de Litovio. En la urbo loĝas 35 000 loĝantoj . Ĝi okupas 1510 hektarojn da areo, tra la urbo fluas kvar riveroj, estas du belegaj lagoj. La urbon de ĉiuj flankoj ĉirkaŭas lagoj, arbaroj kaj montetoj. BET-49 funkcios en moderne kaj bonege ekipita Kolegio de UTENA (pl. Utenio 2, 4) , kie estas luksaj kondiĉoj por laboro de BET-49.

Vidu www.utena.lt. La retejo de turisma informa centro de UTENA estas www.utenainfo.lt, tiu de la Kolegio de UTENA estas www.utenos-kolegija.lt

ALIĜKOTIZO: Ĝis la 31.03.2013: A) 60 lidoj por esperantistoj el Estonio, Latvio, Litovio.

B) 80 lidoj por esperantistoj el ekssovetiaj landoj.

C) 100 lidoj por esperantistoj el ekssocialismaj Eŭropaj landoj.

D) 120 lidoj por okcidentanoj kaj egaluloj.

Ekde la 01.04.2013 aliĝkotizo por ĉiuj kategorioj kreskas plus je 30 lidoj (do, 90, 110, 130, 150 lidoj).

Infanoj , lernantoj kaj studentoj aliĝkotizon ne pagas. Pageblas en ajna konvertebla valuto. Unu eŭro egalas al 3,45 lidoj, la kurzo estas konstanta kaj ne ŝanĝiĝas.

ALIĜO: por aliĝi necesas plenigi aldonatan aliĝilon kiun vi trovas en la retejo de Litova Esperanto Asocio kune kmuin aliaj aktualaj informoj: www.esperanto.lt.

Aliĝkotizo ne estas repagebla. Aliĝo sen pago de kotizo ne validas (krom speciale interkonsentitaj kazoj).

LOĜADO: 1) en bonkvalitaj dultaj kaj trilitaj ĉambroj en Studenta domo de la Kolegio, Unu lito por unu tagnokto kostas 30 lidojn. La prezo ne inkluzivas matenmanĝon.

2) en specialaj pli bone ekipitaj gastĉambroj de la Kolegio, Unu tagnokto kostas 70 lidojn. La prezo ne inkluzivas matenmanĝon.

3) eblas mendi ĉambrojn en urbaj hoteloj-gastejoj. Ni rekomendas bonajn tristelajn gastejojn „Utrana“ (str. Aŭšros 36A) kaj „Filomena“ (str. J. Basanavičiaus 101). Unulita ĉambro kostas 90 lidojn tagnokte, dulta – 140 lidojn tagnokte. Hotelaj prezoj inkluzivas matenmanĝon.

Interesiĝantoj petu pli detalajn informojn aparte. Organiza komitato rezervos ĉiujn ĉambrojn de gastejo „Utrana“. Tiujn ĉambrojn eblas vidi en retejo de turisma informa centro de UTENA www.utenainfo.lt.

MANĜADO: Matenmanĝi eblos en bufedo de Studenta domo, tio koston 10 lidojn tage. Tagmanĝo estas organizata en domo de Kolegio, kie okazos ĉiuj programeroj – bonkvalita tagmanĝo koston 15 lidojn tage.

Pagu anticipe same kiel aliĝkotizon, laŭeble pli frue, esceptokaze eblos pagi ankaŭ surloke veninte dum la registrado. Vespermanĝo ne estas organizata. Tion eblas fari libere en urbaj kafejoj kaj restoracioj.

PROGRAMO : tradicia, t.e. somera universitato, paroligaj kaj perfektigaj kursoj, literaturaj aranĝoj, muzikaj kaj artaj vesperoj, debatoj pri situacio kaj problemoj de Esperanto-movado en Baltiaj landoj, tradukista kurso, pedagogia seminario, seminario de klubestroj kaj aktivuloj, movada lernejo, scienc teknikaj kaj fakaj aranĝoj, instruado de kantoj, junularaj aranĝoj, konkursoj, kvizoj, distraj programeroj, ekskursoj tra la urbo kaj aliaj apudaj vidindaĵoj, diskutoj, forumoj, libroservo, interkona vespero, diservo, baza konatiĝo kun litova lingvo kaj kulturo, ekspozicioj, filmoj kaj lumbildoj, gazetara konferenco, sportaj ludoj, oficiala malfermo kaj fermo, adiaŭa vespero...

Bonvenon al Litovio!

Somera Esperanto-studado 2013

La aranĝo okazos en la nordslovakia historia urbo Martin, situanta 210 km for de la slovakia ĉefurbo Bratislava, 180 km de la pola Krakovo (Kraków), kaj ĉ. 230 km de Budapeŝto, la ĉefurbo de Hungario.

La programo konsistos el kelkaj partoj:

Antaŭtagmeze: instruado pri Esperanto;

Posttagmeze: ekskursoj, prelegoj, manlaboroj, sportoj, laborgrupoj ktp.;

Vespere: Nacia kaj Internacia Vespereoj, koncertoj, filmo-spektado, diskoteko...

Esperanto-instruadon gvidos spertaj Esperanto-instruistoj en 5 grupoj, laŭ la lingvo-nivelo.

Pliajn informojn vi trovos en la retejo de SES: ses.ikso.net



Partoprenintoj de la pasintjara SES

Infana kino

Jen komuniko de la organizantoj de “UNUA VORTO” – internacia festivalo de infana kinokreado, Moskvo, majo 2013:

La 24-an – 26-an de majo 2013 en Moskvo, Rusio, okazos la Unua Internacia festivalo de infana kinokreado "Unua Vorto". Partoprenantoj de la festivalo estas geknaboj en aĝo de 7 ĝis 18 jaroj el diversaj landoj de la mondo – Rusio, Germanio, Italio, Hispanio, Francio, Pollando, Britio, Usono, Israelo, Ukrainio k.a. Por partopreni necesas krei mallongan filmon (de 5 ĝis 20 minutoj), kiu temu pri familio kaj rilatoj inter gepatroj kaj gefiloj, kaj plenigi aliĝpeton en la retejo <http://1slovo.com/eng/>.

Partopreno en la Festivalo estas unika eblo demonstri sin, aŭdi opinion de ekspertoj pri sia laboro, partopreni modellecionojn kaj gajni valorajn premiojn. La ĉefpremio por la plej bona filmo estas \$2000.

Aliĝpetoj estas akceptataj ĝis la 15-a de marto 2013.

Mi kunlaboras kun la organizantoj de la festivalo kaj serĉas esperantistojn, kiuj pretas helpi en la serĉado de potencialaj partoprenantoj – studioj, rondetoj kaj aliaj infanaj organizoj, kiuj okupiĝas pri filma kreado.

Necesos trovi tiaspecajn organizojn, komuniki al ili informon pri la festivalo kaj, okaze de ilia intereso, helpi en partopreno; ekzemple, traduki prezentitajn filmojn uzante Esperanton kiel pontolingvon. Krom la landoj menciitaj en la komuniko, la organizantojn speciale interesas ankaŭ Ĉinio kaj Japanio; kompreneble, oni povas proponi partoprenantojn el aliaj landoj.

La festivalo promesas esti sufiĉe rimarkinda aranĝo; oni jam planas lokan reklaman kampanjon por ĝi. Okaze de sukceso de la proponata iniciato eblos listigi esperantistojn (precipe UEA, kies reprezentanto jam promesis helpon) kiel informajn partnerojn de la festivalo. La organizantoj volonte faros tion.

Se vi volas partopreni ĉi tiun iniciaton, bv. kontakti min laŭ la adreso kirill.svedov@gmail.com por interkonsenti detalojn de la laboro.

Kirill Ŝvedov

FRINGOJ 2013

Ĉiu landa asocio devus dediĉi signifan parton de sia buĝeto, agado al informado, instruado kaj aranĝoj esperantaj organizendaj (kelklande jam okazantaj) por infanoj, junuloj, studentoj. Jen invito al FRINGOJ 2013, okazonta de la 4a ĝis 11a de majo 2013 en Greziljono, Francio.



- En la unua duono de majo 2013, FRINGOJ, jam la 5an fojon, donos al kvindeko da 8- ĝis 17-jaraj junaj eŭropanoj la eblecon renkontiĝi kaj kune travivi ferisemajnon en la verda regiono “Maine-et-Loire” [meneluar’]. La gastejo estos la kastelo Greziljono, nia Eo-kulturdomo jam dum pli ol 50 jaroj.
- Akompanataj de siaj instruistoj, grupetoj venos ekz. el Italujo, Portugalujo, Bulgarujo, Rumanujo, Kroatujo, Ĉeĥujo, Ukrainujo, Hungarujo, Rusujo, Brazilo kaj Francujo. Ĉiuj partoprenontoj, ekde nun, zorge preparas sin por la aranĝo, i.a. per minimume 50 horoj da lernado de la internacia lingvo, kiu estos ilia komuna lingvo dum tiu kultura nterŝanĝo.
- La temo de la renkontiĝo estas realigo de spektaklo, kaj dufoja prezentado de ĝi, antaŭ loka publiko en la festo-salono de Greziljona kastelo aŭ de la Boĵea urbodomo, kaj en la kultur-domo Georges Brassens de Bondy (apud Parizo). Inter la diversaj aktivaĵoj proponotaj laŭ atelier-formo, de la volontuloj (instruistoj kaj junuloj): kantado, koregrafio, folkloroj, poezio, teatro, muziko, magio, plastikaj artoj..., ĉiu superos sin mem kaj uzos ĉiujn proprajn talentojn."

Pliaj informoj: <http://gresillon.org/spip.php?article23lang=fr>

[landa agado]

Grezillon vous invite à franchir le cap de 2013 en musique !

Greziljono invitas vin transiri la komencon de 2013 kun muziko !

feliĉan novjaron !

deziras al vi

partoprenantoj de la Jarfina FESTego en Greziljono

(Handwritten signatures and names follow, including: CEMENT, PONTA, Stanojo, Patricia, Petyja, Sashia, Lie Cove, DUA, Alex Hmel, Ste Tytgat, etc.)





*Esperantistoj
kune festas la
Zamenhoftagon,
la 15-an de
decembro, en
Kopenhago.*

*Kvankam la plimulto de
la membroj de KEK estas
pensiuloj, la klubo
ankaŭ havas kelkajn
membrojn treege junajn!*



*Normala okazaĵo en
Esperantio: klubo
konsistanta
plejparte el danoj
kantas kanton pri
pola judo, verkitan
de anglino kaj
muzikigita de
ukrainino.*